
# ADORU 700




2. Ili paŝis tra angoro,
   tra doloro kaj sufer',
      Vin fidele konfesante
      spite eĉ al mort-danĝer'.
   «Haleluja» kantas ili,
   «halelu-, majesta Di'».

3. Ili venas el la grandaj
   afliktado kaj insid'.
      Ili lavis siajn robojn
      en la sango de l' ŝafid'.
   «Haleluja» kantas ili,
   «halelu-, majesta Di'».

4. Tial ili nun eterne
   staras en anĝela rond'.
      Ilin paŝtas la ŝafido
      apud viva akvo-font'.
   «Haleluja» kantas ili,
   «halelu-, majesta Di'».

5. Kia ĝojo estos, kiam
   vidos ni en Via glor'
      Vin, ho Patro, Vin, ho Filo,
      Vin, Spirito de l' Sinjor'.
   «Haleluja» kantos ni,
   «halelu-, majesta Di'».

WER SIND DIE VOR GOTTES THRONE • EG (Pfalz) 570 • M (Neander = Unser Herrscher): Joachim Neander 1680, Darmstadt 1698 • germana T: Heinrich Theobald Schenck 1719 • E: Albrecht Kronenberger 1994 • Apo 7,9-17